



Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA

**Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj
de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA
kun celaro, postularo, regularo kaj
specimenaj testoj**

Tria eldono

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
Universala Esperanto-Asocio
Rotterdam 2008**

© ILEI kaj UEA, 2008

ISBN 978 92 9017 104 1

Kompostita kaj enpaĝigita en la Centra Oficejo de UEA

Kovrilo: Francisco L. Veuthey

Desegnaĵoj: Pavel Rak

Presita ĉe Grafokom, Kroatio

Enhavo

Enkonduko	5
Resuma historio de la Ekzamenoj	6
Kiel internaciaj?	7
La ekzamena procezo	8
Pri la du niveloj	9
Postularo de la Ekzamenoj	10
Oftaj demandoj pri la Internaciaj Ekzamenoj	16
Specimenaj Ekzamenoj	20
Elementa Ekzameno	20
Meza Ekzameno	28
Apendico: Regularo de la elementa kaj meza niveloj de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA	37
Pri ILEI	39



Enkonduko

La Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kunlige kun la Universala Esperanto-Asocio (UEA) prezentas al vi la trian eldonon de la Gvidilo al la Internaciaj Ekzamenoj, niveloj elementa kaj meza.

Por la reviziita eldono ni pensis: “Kion vere bezonas la kandidato?” Responde ni konkludis, ke ne tiom gravas formalaj klarigoj pri la sistemo mem, sed ĉefe ĉia informo kiu povos helpi la kandidaton kompreni la celon kaj enhavon de la ekzamenoj, kaj kiel plej efike prepariĝi por ili.

Vi do espereble trovos en tiu ĉi broŝuro pli da praktikaj informoj: Kiel oni aranĝas la ekzamenadon? Kiel vi preparu vin? Kien turni vin por havigi utilajn studmaterialojn kaj trovi pli da informfontoj? Vi trovos novajn specimenojn de la ekzamenoj mem je ambaŭ niveloj. Ni krome donas konsilojn kaj, en nova sekcio, respondojn al la plej oftaj demandoj, kiujn kandidatoj direktas al la Komisiono.

La nova eldono unuafoje inkluzivas interretajn adresojn, kiuj kondukos vin al riĉaj fontoj de utilaj informoj kaj interesaj tekstoj. La fako “Internaciaj Ekzamenoj” ĉe www.edukado.net daŭre enhavos legindajn konsilojn kaj novaĵojn, kiuj kompletigu tiun ĉi broŝuron.

En la estonteco gravos ankaŭ la pli vasta utiligo de teknologiaj rimedoj por plifaciligi la aliron al preparado kaj al la ekzamenoj mem. IEK daŭre sekvas la evoluon de internaciaj normoj por la ekzamenado pri fremdaj lingvoj por ke ankaŭ nia sistemo profitu de novaj eblecoj por ekzamenado.

Laŭ siaj planoj IEK intencas esplori la ideon prepari aŭ kunlabori en la preparado de du aliaj ekzamen-niveloj. Unuavice estas bezonata Internacia Ekzameno pri Instruakapablo, kiu povus atesti laŭ rigoraj kriterioj, ke la kandidato havas la necesajn sciojn kaj kapablojn por instrui la lingvon. Restas ankaŭ la demando, ĉu jam revenas la tempo pritrakti renovigitan superan nivelon (pri kies mallonga historio vi povos legi aliloke en la Gvidilo).

Gravas por internacieco la ebleco ekzameniĝi en kiel eble plej disaj mondpartoj. IEK sukcesis kuraĝigi la organizadon de ekzamensesioj sur ĉiuj kontinentoj, por ke kiel eble plej multaj personoj edukiĝintaj pri la Esperanta lingvo kaj kulturo povu sin prezenti al la Internaciaj Ekzamenoj post spertiĝo kaj loka elprovado.

Ni esperas, ke la nova Gvidilo ebligas al ĉiuj siaj legantoj rekoni la sindediĉon al Esperanto, kiun reprezentas atestilo pri sukceso en la Internaciaj Ekzamenoj. La tralegado instigu al ili prepari sin por mem sperti tian sukceson!

D-ro Duncan CHARTERS
Prezidanto, IEK, 2000-2006

Resuma historio de la Ekzamenoj

Universala Esperanto-Asocio (UEA) dum longa tempo funkciigis sistemon de ekzamenoj. Aliflanke Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) ellaboris sian propran sistemon. UEA reformis siajn ekzamenojn en 1982 sub la gvidado de estrarano Baldur RAGNARSSON, kunlabore kun István SZERDAHELYI, Gerald TUCKER kaj Claude GACOND, por restarigi la elementan kaj mezan nivelojn intertempe ne plu funkciintajn.

De tiu tempo la ekzamenoj estis proponataj je tiuj niveloj dum la Universalaj Kongresoj, ĝenerale sub la gvidado de ties verkinto, mag. Irena SZANSER, kaj ĉiujare sukcesis averaĝe dudeko da kandidatoj.

Samtempe la supera nivelo ĉesis funkcii; ĝi ja estis tiom postulema, ke nur kvin personoj en la mondo sukcesis trapasi ĝin. Tion kaŭzis ne la nivelo en si mem, sed la severaj devigoj pri legado kaj preparado, kiujn povus plenumi nur homo kun abunda libera tempo, gvidata individue de kompetentulo pri movadhistorio kun simile disponebla tempo.

En 1986 ILEI transprenis la edukajn taskojn de UEA kaj kadre de tiuj jam en 1988 transformis la Internaciajn Ekzamenojn, unu el la plej gravaj komunaj projektoj de ambaŭ organizaĵoj.

Sub prezido de Till DAHLENBURG kaj sekretario Stefan MACGILL la relanĉo en 1989 konkretiĝis per akceptita regularo, starigo de Internacia Ekzamena Komisiono (IEK), nomigo de kvardeko da ekzamenantoj kaj aperigo de la unua Gvidilo. La nombro de sesioj jare rapide kreskis de unu aŭ du al sep ĝis dek, kun kandidata averaĝo de 65 jare (kaj pinto de 102 en 1991). La ekzamenoj iĝis tutmondaj: en la periodo 1989-1993 okazis 41 sesioj en 20 landoj sur 4 kontinentoj. Sukcesis 335 kandidatoj el 38 landoj.

Prezidanto Atiljo ORELLANA ROJAS kaj sekretario Hans TEN HAGEN agis de 1994-2000; post tio prezidanto Duncan CHARTERS kaj sekretario Bill MAXEY transprenis la torĉon kaj kun la koncernaj komisionanoj provis sekvi la linion antaŭe ellaboritan.

En la 15 jaroj depost la relanĉo okazis 127 ekzamensesioj en kvardeko da landoj sur kvin kontinentoj. Entute 697 uzantoj de Esperanto nun posedas dokumenton, kiu nome de ILEI kaj UEA atestas ilian kapablon uzi la lingvon en internaciaj medioj.

En 2002 aparta fako pri la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA estis aldonita al la retejo www.edukado.net, kiu nun – kune kun tiu ĉi broŝuro – estas grava fonto de informoj kaj loko por provekzamenoj.

En 2004 la gvidorganoj de ILEI kaj UEA aprobis kelkajn ŝanĝojn al la Regularo, tiel ke ĝi oficiale konformiĝu al kutimoj, kiuj efektive evoluis dum la antaŭa jardeko.

Pro la kreskanta intereso pri Esperanto kaj la rapidaj ŝanĝoj en disponebla teknologio, jam staras antaŭ la Internacia Ekzamena Komisiono la defio plitaŭgigi la jam sukcesan sistemon, reveki la intereson pri la ekzamenoj kaj stimuli okazigon de pli da sesioj kun pli da kandidatoj kaj sukcesintoj. Jam de jaroj estas plano restarigi la superan nivelon, kio devas esti aldona granda tasko por la venonta IEK.

Kiel internaciaj?

La Internaciaj Ekzamenoj (IE) de ILEI/UEA estas internaciaj laŭ kelkaj perspektivoj.

Laŭ normoj: IE havas samnivelajn testojn kaj egalajn kriteriojn kaj normojn por ĉiu sesio, kie ajn en la mondo. Atestiloj de ILEI/UEA do signifas la saman atingon por ĉiu sukcesinto.

Laŭ enhavo: IE estas unulingvaj, t.e. tute en Esperanto, kaj do taŭgas por ĉiu kandidato, senkonsidere de ties denaska lingvo. La tekstoj estas aŭtentikaj, ĉerpitaj el la tutmonda Esperanta literaturo kaj gazetaro.

Laŭ celoj: IE rekte taksas la praktikan kapablon uzi Esperanton je internacia nivelo, t.e. por komuniki rekte kaj senprobleme kun homoj el aliaj landoj. La ekzamenaj taskoj spegulas tiun ĉi kernan celon.

Laŭ la ekzamenantaro: La ekzamenaj taskoj estas prijuĝitaj de speciale rajtigita teamo, la Loka Ekzamena Komisiono LEK. “LEK estu internacia kun parolantoj de minimume du malsamaj denaskaj lingvoj” (el Regularo de la IE, artikolo 2, litero c). Tiu ĉi postulo certigas, ke kandidatoj pruvos siajn lingvokapablojn en internacia medio.

En kelkaj landoj ekzistas por Esperanto naciaj ekzamenaj sistemoj, kiuj havas proprajn celojn kaj apartajn regularojn. Ili foje taksas progreson je niveloj sub tiuj de la Internaciaj Ekzamenoj aŭ foje je eĉ pli altaj. Tiuj ekzamenoj ofte testas sciojn pri lingva strukturo aŭ komprenon pri kelkaj legendaj tekstoj aŭ specifaj kulturaj okazintaĵoj, kaj povas esti ankaŭ pli postulemaj aŭ pli rigoraj ol la Internaciaj Ekzamenoj. Ili tipe estas dulingvaj kaj inkluzivas traduktaskojn.

La Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA tamen restas la solaj, kiuj estas aŭspiciitaj de internaciaj organizaĵoj kaj kies ĉefa celo estas atesti pri la praktikaj komunikaj kapabloj de lingvouzantoj en la tuta Esperanta mondo.

Interesitoj pri ekzameniĝo do havas kelkajn elektojn, kiuj povas bone kompletigi unu la aliajn.

La ekzamena procezo

La Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA okazas nur en iuj lokoj. Ne eblas fari ilin per poŝto aŭ tra la Interreto. Okazigo de sesio kadre de la Universala Kongreso de Esperanto estas certa; aliaj okazas laŭ peto de la organizantoj de diversaj esperantlingvaj kongresoj kaj alispecaj aranĝoj dise en la mondo. Ĉiu sesio devas esti aprobita de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK), kiu prizorgas ankaŭ la preparadon de la materialoj, la kontrolon de la rezultoj kaj la disdonon de la atestiloj al la sukcesintoj.

La ekzamensesio mem havas Lokan Ekzamenan Komisionon (LEK), kiu havas prezidanton kaj du aliajn membrojn, kiuj kune respondecas por ĉio dum la sesio. La ekzamenantoj estas rajtigitaĵ kaj aprobitaĵ de IEK kaj devas certigi, ke la sesio okazas en plena akordo kun la Regularo de la elementa kaj meza niveloj de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA (vidu la Apendicon). Laŭ la ekzamena regularo LEK “estu internacia kun parolantoj de minimume du malsamaj denaskaj lingvoj”. Tiu triopo starigas la horaron, pretigas la ekzamenejon, gvidas la unuopajn sesiojn, kune taksas la skribitajn testojn kaj parolajn taskojn, anoncas la rezultojn kaj krome plenumas multajn administrajn devojn.

Tiu, kiu volas ekzameniĝi, devas unue kontakti la anoncitan lokon, informiĝi pri la ekzamena horaro kaj prezenti sin akurate en la ĝusta loko por enskribiĝi kaj pagi. Poste okazas la gramatika testo (40-50 minutoj) kaj informo pri la rezultoj. Sukcesintoj devas aperi poste, laŭ la horaro, por la tri-hora skriba sesio (plus eventualaj paŭzoj), dum kiu ili plenumos diversajn taskojn en 5-6 apartaj testoj. Post zorga tralegado kaj poentumado de la testoj, kio kutime daŭras kelkajn horojn, la ekzamenantoj anoncas la rezultojn. Laŭ specifa horaro, plejofte la sekvan tagon, ĉiu kiu sukcesis en la skriba parto submetiĝas al unuopa parola ekzameno, kiu konsistas el tri mallongaj eroj.

Post kalkulado de la poentsumoj por la skriba kaj la parola partoj, LEK kutime anoncas surloke la ekzamenajn rezultojn. Krom se membro de IEK partoprenis en la ekzamenado, la rezultoj tamen restas provizoraj ĝis la kontrolo kaj certigo de IEK. La atestiloj estas publike disdonataj nur post la UK-sesio. Post aliaj ekzamensesioj IEK sendas la atestilojn poŝte.

La nuna gvidilo liveras informojn pri la strukturo de la ekzamenoj kaj la postulataj taskoj, kun specimenaĵ testoj kaj utilaj konsiloj.

Pri la du niveloj

Ĉar la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA ne havas kiel bazon konkretan stud-programon aŭ devigan legoliston, necesas priskribi la kapablojn, kiuj indikas, ke esperantisto funkcias je ĉiu nivelo. Lingvouzanto, kiu jam sukcese faras tiujn taskojn, verŝajne estas preta demonstri siajn kapablojn per la Internaciaj Ekzamenoj.

Kiu deziras kandidatiĝi por la Internaciaj Ekzamenoj devas do bone kompreni la du nivelojn kaj zorge elekti laŭ siaj efektivaj kapabloj.

La elementa nivelo

La elementa nivelo reprezentas la minimumajn kapablojn necesajn por kontentige funkcii en internacia medio. Tio signifas interrilati sen gravaj miskomprenoj, parole kaj skribe, kun esperantistoj el aliaj landoj kaj kulturoj. La kapabloj klare informi kaj rakonti estas ĉefaj. La kutimaj temoj je tiu ĉi nivelo estas ĝeneralaj kaj ĉiutagaj, pri personaj trajtoj kaj spertoj, pri lando kaj familio, pri rilatoj kun Esperanto kaj ties kulturo. Personoj je la elementa nivelo jam firme posedas la lingvon kaj aktive orientiĝas al la diversaj facetoj de la Esperanta komunumo. Aldone ili povas informiĝi kaj amuziĝi pere de senornamaj prelegoj, gazetaj artikoloj kaj simplaj noveloj.

La meza nivelo

La meza nivelo estas tiu, je kiu funkcias aktivaj esperantistoj kun kelkjara sperto en la internacia komunumo. Ili do kapablas ne nur informi kaj rakonti sed ankaŭ esprimi siajn opiniojn pri diversaj temoj kaj pravigi ilin argumente. Ili povas senĝene skribi reagon al artikolo, klare esprimante propran vidpunkton, aŭ eĉ verki originalan artikolon. Ili kapablas raporti skribe pri iu prelego aŭ parolado, aŭ taŭge protokoli kunsidon. Ili povas paroli kun iu ajn esperantisto pri larĝa gamo de ĝeneralaj temoj, kaj personaj kaj rilataj al la Esperanta mondo. Pro sia bona kono de tiu komunumo ili povas riĉigi siajn paroladon kaj argumentadon per trafaj mencioj pri eventoj, homoj kaj dokumentoj en la Esperanta kulturo; kaj inverse, ankaŭ kapti la aludojn de aliaj. Ili ofte legas kaj senprobleme povas kompreni la plimulton de artikoloj en diversspecaj gazetoj kaj ĝenerale literaturon en la klasika stilo, inkluzive de romanoj. Ili sentas sin tute hejme en Esperantaj medioj, ekz. ili povas ĝui dum UK ĉiun programeron krom eventuale la plej fakaj.

Postularo de la Ekzamenoj

La sinsekvo de la ekzamenaj eroj estas: gramatika testo, skriba kaj poste parola partoj. La gramatika testo povas okazi nur mallonge antaŭ la ĉefa ekzameno aŭ, ekz. kaze de prepara kurso, eĉ en antaŭa tago.

Gramatika testo

La gramatika testo funkcias ĉefe kiel kribilo por provi certigi, ke tiuj, kiuj prezentas sin por la Internaciaj Ekzamenoj, jam konas la strukturon de Esperanto sufiĉe bone por plenumi la postulatajn taskojn. Tiuj, kiuj ne sukcesas en la gramatika testo, ne rajtas fari la ekzamenon.

Sukceso en la gramatika testo simple ebligas pluiron al la ekzameno. Ĉar la gramatika testo ne estas parto de la ĉefa ekzameno, la gajnita poentsumo neniel kontribuas al la rezulto de tiu ĉi ekzameno.

La malmultaj fokusoĵoj de la gramatika testo estas sur fundamente gravaj partoj de la Esperanta gramatiko, kies regado estas necesa por komprenebla lingvouzo.

Elementa gramatika testo

La elementa gramatika testo havas kvin partojn, per kiuj estas testataj jenaj gramatikaĵoj:

1. akuzativo;
2. prepozicioj;
3. transitiveco de verboj;
4. tabelvortoj;
5. afiksoj.

(Specimeno de elementa gramatika testo troviĝas sur paĝo 20.)

Meza gramatika testo

Ankaŭ la meza gramatika testo havas kvin partojn, per kiuj estas testataj jenaj temoj:

1. akuzativo;
2. prepozicioj;
3. participoj;
4. tefleksivo;
5. leksiko.

Je la meza nivelo la legaĵoj estas iom pli malfacilaj kaj la taskoj pli defiaj ol en la elementa gramatika testo.

(Specimeno de meza gramatika testo troviĝas sur paĝo 28.)

Skriba parto

La skriba parto oficiale bezonas tri horojn. Por la elementa ekzameno, aldoniĝas 10-15 minutoj por la Diktaĵo. La Loka Ekzamena Komisiono havas la rajton decidi ĉu permesi paŭzeton meze de la ekzameno aŭ ne.

Vortaroj kaj aliaj helpiloj estas en la ekzamenejo komplete malpermesataj.

Speciala peto al la kandidatoj estas skribi (aparte eseojn) per klare legeblaj literoj.

(Specimenoj de elementa kaj meza skribaj ekzamenoj komenciĝas sur paĝoj 23 resp. 34.)

1. Lega kompreno

En la elementa nivelo la kandidato ricevas tekston, kies amplekso estas proksimume 250 vortoj. La enhavo estas informa, popularscienca aŭ literatura. Por montri sian komprenon la kandidato devas skribi mallongajn respondojn al 4-6 demandoj, kiuj celas eltiri informojn prezentitajn en la teksto.

Krome, troviĝas listo de 8-10 vortoj por kiuj samsignifaj vortoj aperas en la teksto. La kandidato devas trovi la taŭgajn vortojn.

En la meza nivelo la teksto ampleksas 300 ĝis 400 vortojn kaj estas iom pli specife literatura aŭ scienca, sen esti rekte faka. Inter la 4-6 demandoj troviĝas kelkaj, kiuj devigas la kandidaton fari supozojn, analizojn aŭ komparojn kaj uzi frazojn ne rekte tireblajn el la teksto mem.

Ankaŭ en la meza nivelo troviĝas la tasko trovi en la teksto sinonimojn de 8-10 vortoj aŭ esprimoj.

La rekomendata tempouzo por ĉi tiu tasko estas 45 minutoj.

Diktaĵo (nur en la elementa nivelo)

Du membroj de LEK kun malsama denaska lingvo laŭtleagu la tekston ĉiu unufoje, unu el ili kun la bezonataj ripetadoj kaj ritmo. Ili legas proksimume 100-vortan tekston enhavantan ĉiujn Esperantajn literojn, kiun la kandidatoj devas ĝuste skribi.

Eseo

La kandidato devas elekti inter kvar temoj, el kiuj du temas pri Esperanto, du ne nepre pri ĝi. Du estas pli specifaj kaj du tre ĝeneralaj.

Je la elementa nivelo la postulo estas minimume 400 vortoj, kaj la verko devas informi aŭ rakonti, depende de la temo. La stilo povas simili al longa letero aŭ al neformala gazetartikolo.

Je la meza nivelo oni devas skribi minimume 600 vortojn, kaj la stilo estas pli formala, postulanta opiniojn pri la elektita temo kaj detalojn kiuj subtenas aŭ pravigas ilin.

Estas tri ĝeneralaj kriterioj por la takso de la eseo: lingva ĝusteco, idea enhavo kaj stilo. Por ĉiu la Loka Ekzamena Komisiono aljuĝas po dek poentojn.

Lingva ĝusteco rilatas al zorga atento al lingvouzo, aparte ĝustaj finaĵoj, taŭga vortostoko kaj literumado.

Idea enhavo rilatas al la denseco kaj kvalito de ideoj. La eseo devas enhavi sufiĉe da bonaj ideoj por krei intereson, sed ne tiom, ke iuj devas resti sen evidenta rilato al la tuto.

Stilo rilatas ĉefe al la organizado de la verko, kiel la diversaj ideoj interrilatas inter si, kiel efike la ideoj estas esprimitaj ktp. Verkanto, kiu ne nur klare esprimas sin sed ankaŭ sukcese montras en la eseo sian propran personecon, certe ricevos krompoentojn. Atentu tamen, ke, se la longo de la eseo ne plenumas la postulon, la ekzamenantoj devige forprenos stilpoentojn.

Por ĉi tiu tasko la disponebla tempo estas 60 minutoj je ambaŭ niveloj.

4. Aŭskulta kompreno

Je ambaŭ niveloj la kapablo aŭskulti estas testata skribe laŭ du malsamaj vojoj. Antaŭ la komenco de la ekzameno la ekzamenantoj informos kiam en la tri-hora periodo komenciĝos la aŭskulta testado.

Unue la kandidato devas aŭskulti laŭtleĝatan aŭ sonregistratan tekston kaj skribe respondi anticipe donitajn skribitajn demandojn pri ĝi. Tiu teksto estas legata dufoje je proksimume 80 (por la meza 100) vortoj minute, kun interrompo de triminuta paŭzo. Du membroj de LEK kun malsama denaska lingvo laŭtleĝu la tekston ĉiu unufoje. Dum la aŭskultado la kandidato rajtas fari notojn kaj jam dum la paŭzo rajtas eklabori. Oni montras komprenon per klaraj skribaj respondoj al 4-5 demandoj. La kandidato ne rajtas vidi la tekston (sed specimenoj aperas sur paĝoj 23-25 kaj 32-34 de la Gvidilo).

Tiu ĉi parto daŭras ĝis 15 minutoj.

Sekvas laŭtleĝado de la dua parto de la sama aŭ samtema teksto, kiun la kandidato devas resumi ĝis proksimume 60% de ĝia originala longeco. La teksto estas laŭtleĝata dufoje, kun kvinminuta paŭzo inter la du aŭdigoj, dum kiuj la kandidato rajtas eklabori.

La celo de tiu ĉi tasko ne estas redoni la tutan tekston laŭvorte, sed raporti nur la gravajn ideojn kun kelkaj detaloj, ordigitajn laŭ la plano de la preleginto.

La kvarfoja legado kune kun la interspacoj daŭros ĉ. 40 minutojn; post tio la kandidatoj decidu mem kiom da tempo dediĉi al la finado de la tasko.

5. Kulturaj konoj

La kulturaj konoj estas testataj skribe. La ekzamenantoj atendas, ke la kandidatoj posedu sciojn pri la historio, organizo, aplikado kaj literaturo de Esperanto.

Je la elementa nivelo aperas listo de 20 priskriboj pri diversaj elementoj de la Esperanta kulturo kaj komunumo kaj dua listo de 24 eblaj respondoj. Necesas ĝuste parigi la indikojn.

La tasko antaŭsupozas, ke la elementa kandidato jam komencas esplori kaj orientiĝi en la Esperanto-kulturo. Necesas rekoni kelkajn el la plej gravaj datoj, nomoj, dokumentoj kaj eventoj en la historio de Esperanto kaj kelkajn faktojn pri diversaj fakoj de la nuntempa Esperanta komunumo.

Je la meza nivelo oni trovas 20 frazojn pri diversaj aferoj rilate al la Esperanta kulturo kaj komunumo. Al ĉiu frazo tamen mankas la kerna nomo, titolo aŭ alia trajto. La kandidato devas skribi la ĝustajn respondojn en la spacoj.

La meza testo supozas, ke la kandidato, kiel aktiva esperantisto, bone konas kaj eĉ jam spertis multajn elementojn en la Esperanta kulturo. Pli profunda intereso pri tiu kulturo, inkluzive de la historio kaj evoluado de la lingvo kaj la movado, la plej gravaj organizaĵoj kaj dokumentoj, la elstara klasika literaturo, utilaj konsultlibroj kaj informfontoj kaj la bunta nuntempa komunumo, devas konduki al konsiderindaj konoj.

Por ambaŭ niveloj tiu ĉi tasko daŭras maksimume 30 minutojn.

Parola parto

Ĉiu kandidato ekzameniĝas unuope kaj private antaŭ trimembra ekzamena komisiono. Kelkaj malsamaj elementoj de la parolkapablo estas taksataj per tri malsamaj taskoj.

Unue, por pruvi sian kapablon samtempe aŭskulti, kompreni kaj paroli, la kandidato devas dum po 3-4 minutoj interparoli kun la ekzamenantoj pri 2 el 8 ĉiutagaj temoj hazarde elektitaj komence de la parola ekzameno. La ekzamenantoj prijuĝas taŭgan reagon al demandoj, regadon de la rilata leksiko kaj parolan klarecon kaj prononcadon. (La temlistojn por la elementa kaj meza ekzamenoj vi povas tralegi sur paĝoj 26 resp. 35.)

En la dua tasko la kandidato hazarde elektas 2 demandojn (el listo simila al tiu en la specimenoj) pri la Esperanta kulturo kaj komunumo, kiujn li/ŝi devas rekte respondi dum po 3 minutoj.

Por prijuĝi la respondojn la ekzamenantoj kalkulas po 4 poentojn por ĉiu demando kaj estas same taksataj la enhavo, scioj, lingva ĝusteco, lerta lingvouzo kaj klara esprimado de la ideoj.

Je la elementa nivelo la demandoj estas iom ĝeneralaj kaj rilatas plejparte al historiaj temoj, kiuj estas oftaj en bazaj kursoj, al propraj spertoj kiel lernanto/

uzanto de Esperanto aŭ al oftaj nomoj aŭ gravaj eventoj en la nuntempa Esperanta mondo. Por la elementa nivelo ekzamenantoj atendas, ke kandidatoj estu jam legintaj almenaŭ 2-3 originalajn verkojn kaj kapablu paroli pri iliaj enhavo kaj valoro.

Je la meza nivelo la demandoj estas iom pli specifaj kaj antaŭsupozas proprajn spertojn en la Esperanta komunumo kaj pli larĝan sciaron pri diversaj facetoj de la kulturo. Persona konatiĝo kun la plej gravaj literaturaj verkoj estas simile atendata.

Notindas, ke la kulturaj scioj formas nur trionon de la parola ekzameno, kaj la ekzamenantoj serĉas unuavice la kapablon lerte uzi la lingvon por klare esprimi la ideojn

La tria tasko en la parola ekzameno petas la kandidaton rigardi bild(stri)on kaj klarigi la situacion prezentatan tie. La ekzamenantoj aljuĝas po 5 poentojn por originaleco, lingva ĝusteco kaj taŭga reago al la demandoj. (Por blinduloj troviĝas objektoj prezentantaj unu ideon aŭ okazaĵon, ekz. butikon, oficejon, feston. Eblas fari ankaŭ rakonton laŭ kasedaj sonoj.)

El praktika vidpunkto

Estas rekomendinde, ke kandidatoj zorge atentu la strukturon de la ekzamenoj por ekkonscii pri la relativa graveco de ĝiaj elementoj. En la skriba parto, kandidatoj bone porciigu sian tempon inter la taskoj, laŭ la poenta valoro kaj la memtakso de la propraj kapabloj.

La ekzamenaj taskoj similas al normalaj ĉiutagaj taskoj en la vivo de aktiva esperantisto. Se ili tamen ŝajnas tro postulemaj, oni ne forgesu tion, ke jam 60% (90 el 150 poentoj) rezultigas ekzamenan sukceson.

Laŭ la Regularo de la Internaciaj Ekzamenoj la fina rezulto de la elementa ekzameno povas estas nur sukceso aŭ malsukceso. La meza ekzameno tamen havas tri gradojn de sukceso: kontentiga (90-110 poentoj), bona (111-130) kaj tre bona (131-150).

En ambaŭ niveloj – laŭ poentvaloro – la plej gravaj kapabloj estas la parola (50 poentoj), kaj la lega kaj la skriba (po 30). Sekvas la aŭskulta parto, kaj post tio la kulturaj konoj. Se la kernaj lingvaj kapabloj estas solidaj, magra kono pri la kulturo ne aŭtomate fiaskigos sukcesan ekzameniĝon. Aparte bona konatiĝo kun la kulturo tamen povas altigi la gradon de sukceso, precipe en la meza nivelo.

Bv. noti unu gravan sekvon de tio, ke la skriba kaj parola ekzamenoj estas apartaj unuoj. Tio signifas, ke ene de la skriba parto pli bona rezulto en unu testo povas iugrade kompensi malpli bonan en alia. Aparte bona legkapablo do povas funkcii kiel kontraŭpezo al ekz. malpli bona aŭskultkapablo. Sed nur tiuj kandidatoj, kiuj sukcesas en la skriba parto, rajtas fari la parolan parton. Eĉ la plej bona parolkapablo ne povas kompensi malfortatojn en la skribe taksataj kapabloj.

Utilaj rimedoj

La subaj listoj neniel enhavas devigajn legaĵojn. La proponoj estas simple vojontriloj por tiuj, kiuj entute ne scias kion legi, el kiuj fontoj plibonigi siajn konojn kaj evoluigi siajn lertojn.

Kultura superrigardo

Jen kelkaj speciale riĉaj fontoj de informoj pri la Esperanta kulturo, kiuj povas gvidi vin al facetoj aparte allogaj al vi.

Epitomo de esperantologio (Gudskov). Bonege laŭfakte ordigita superrigardo de la Esperanta kulturo, kun trafa komentario.

Vojaĝo en Esperanto-lando, 2a aŭ 3a eldono (Kolker). Trezoro de diversspecaj literaturaj kaj gazetaĵaj tekstoj, kun multaj fotoj kaj utilaj informoj, kiu plaĉe faciligas la esploron de la historia kaj nuntempa kulturo de Esperanto.

Gvidlibro/Jarlibro de UEA. Bona fonto de informoj pri multaj facetoj de la nuntempa Esperanta mondo.

Frue konatiĝi kun kelkaj internaciaj Esperanto-gazetoj (ekz. *Esperanto*, *Kontakto*, *Monato*, *Ondo de Esperanto*) estas nepre paŝo.

Originala literaturo

Ni ne preskribas legadon de konkretaj verkoj, sed jes ja atendas, ke vi konu niajn plej gravajn aŭtorojn kaj iliajn verkojn, eĉ se vi ne legis ilin.

El nia originala literaturo do elektu kelkajn verkojn, kiuj lingvonivele kaj enhance proksimas al vi. Jam por la elementa nivelo oni atendas, ke vi legu 2-3 verkojn kaj kapablu paroli pri iliaj enhavo kaj valoro. Post preskaŭ 120 jaroj, la literaturo en Esperanto – kaj historia kaj nuntempa – vere abundas kaj ebligas multajn kontentigajn elektojn. Bv. memori, ke ne tiel gravas la verko, kiun vi legas, kiel la informoj, spertoj kaj konoj, kiujn vi per tio akiras.

W. Auld kompilis la t.n. Bazan legoliston, konsulteblan en la ekzamena sekcio de www.edukado.net, kiu povas doni al vi ideojn pri eventualaj legendaĵoj. Tio tamen ne bremsu vian esploron de aliaj verkoj, aparte la nuntempaj.

Ekzistas kelkaj retejoj, de kie oni povas elŝuti literaturaĵojn. Vi povas ĉerpi materialojn ekz. el <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html>.

Aŭdkompreno

Eĉ hodiaŭ bedaŭrinde mankas sufiĉe da utilaj sonmaterialoj por praktiki la aŭskultadon. La plej bona ekzerco, kompreneble, estas persone aŭskulti prelegojn kaj paroladojn dum Esperantaj renkontiĝoj. Aliaj ebloj:

Ĉu vi aŭdis, ke...? (Smidéliusz). Kasedo kaj tekstoj kun taskoj kaj solvoj.

Radio-elsendoj (konsultiĝu ĉe: <http://osiek.org/aera>) kaj sonmaterialoj de diversaj retejoj, inklude www.lernu.net.

Lega kompreno

Legi ofte kaj pri tre diversaj temoj estas la ŝlosilo al flua legado kun bona kompreno. Vidu la rubrikon pri originala literaturo supre. Aldone:

Vere aŭ fantazie? (Piron). Verkita kun la specifa celo plibonigi la legkapablon per laŭgrada enkonduko kaj uzo de novaj radikoj en kiel eble plej diversaj formoj.

Diverstemaj gazetoj (ekz. *Esperanto*, *Ondo de Esperanto*, *Kontakto*, *Monato*, *Juna Amiko*).

Verkado

Ne tiel, sed tiel ĉi! (Faulhaber). Malnova sed ankoraŭ tre utila gvidilo al klara verkstilo en Esperanto.

Oftaj demandoj pri la Internaciaj Ekzamenoj

Aliĝo, pago

Kie mi povas ekzameniĝi?

Necesas ekzameniĝi ĉeestante en oficiala sesio de IE. Ĉiujare okazas ekzamen-sesio kadre de UK, kaj aliaj okazas en diversaj mondpartoj laŭ peto de organizantoj de diversaj aranĝoj. Vi povas kontroli la jam anoncitajn sesiojn ĉe www.edukado.net aŭ peti tiujn informojn de la Sekretario de IEK.

Kiom kostas la ekzameno?

Laŭ la Regularo de IE la kosto egalas al 60% de la MA-kotizo de UEA por la loĝlando de la kandidato. Por la UK-sesio oni proponas rabaton por tiuj, kiuj anoncas sin kaj pagas antaŭ la komenco de la Kongreso. Tiukaze la kosto estas nur 40% de la MA-kotizo.

Kiel mi povus pagi?

Kutime oni oficiale enskribiĝas kaj pagas surloke, antaŭ la gramatika testo. Por la UK-sesioj oni povas antaŭpagi pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Por aliaj ebloj oni informiĝu ĉe la organizantoj de la koncerna aranĝo.

Ĉu oni povas ekzameniĝi en du partoj, dum du malsamaj sesioj?

Ne. Necesas fari la skriban kaj parolan partojn dum la sama sesio.

Ĉu sukceso en la elementa ekzameno estas antaŭkondiĉo por fari la mezan?

Ne. Vi rajtas elekti la nivelon, kiu plej konvenas por montri viajn kapablojn. Eĉ unufoje sukcesinte en la meza nivelo, vi rajtas refari ĝin cele al pli alta grado.

Ĉu mi ekzameniĝu nur post sukceso en nacia ekzameno?

Aliro al al Internaciaj Ekzamenoj ne dependas de antaŭa sukceso en ajna alia ekzameno. Tio signifas, ke sukcesa ekzameniĝo je nacia nivelo ne estas kondiĉo. Estas tamen rekomendinde, ke intereso objektive taksu siajn konojn, mezuriĝu en ekzamenoj je malpli alta nivelo ol celata dum la internacia. La sperto mem estas plej ofte tre valora, kaj la rezultoj povas gvidi vin en la prepariĝo por la Internaciaj Ekzamenoj.

Prepariĝo, ekzamenado

Kiel mi preparu min?

Kompreneble, la nemalhavebla bazo estas firma kompreno de la strukturo kaj sonsistemo de Esperanto, kune kun baza vortostoko. Preter tio, tamen, ĉar IE taksas praktikajn kapablojn uzi Esperanton, gajni sperton estas ĝenerale pli valore ol amasigi sciojn. Vi do profitu ĉiun oportunon *uzi* la lingvon – lege, skribe, aŭskulte kaj parole – kiel eble plej diversmaniere. Tiel agi kondukos vin nature en la Esperantan kulturon, kiun vi pluesploru laŭ viaj propraj interesoj. Laŭgrade vi atingos la unuan internacian nivelon (elementan) kaj poste la duan (mezan).

Ĉu estas apartaj konsiloj rilate la eseon?

Vi devas aparte konscii, ke unu horo ne estas longa tempo por krei bonan eseon. Ĝi tamen sufiĉas por tiuj, kiuj jam al kutimiĝas al ofta verkado de iom longaj skribaĵoj pri diversaj temoj. Aliflanke por tiuj, kiuj plej kutime nur sendas mal-longajn retmesaĝojn kaj neniam provis verki longan leteron aŭ artikolon (kaj sen vortaro!), la ekzamena tasko povas montriĝi vere defia. Verŝajne mankos tempo por rekopii aŭ revizii vian tekston, do verkado devas jam esti senĝena okupo por vi. Necesas almenaŭ kelkaj provoj antaŭ la ekzameniĝo.

Kie mi povas testi miajn konojn?

Vi trovas specimenojn kaj en tiu ĉi eldonaĵo kaj en la retejo www.edukado.net. En la retejo pluraj specimeneroj havas version eĉ kun tujaj solvoj. Pluraj hejmpaĝoj proponas ret-ekzamenojn kaj testojn, ofte mem-kontrolajn.

Kiujn literaturajn verkojn mi legu?

Ĉar IE testas praktikajn kapablojn kaj ne sciojn pri aparta studprogramo, oni ne postulas la legadon de specifaj verkoj. Oni antaŭsupozas firman gramatikan bazon kaj postajn spertojn i.a. pri la literaturo de Esperanto. Je la elementa nivelo la kandidato devus kapabli legi tekstojn de tipaj legolibroj kaj ankaŭ aŭtentikajn kaj malkomplikajn novelojn. Je la meza nivelo oni kapablu legi eĉ romanojn en la klasika stilo. La grava afero estas, ke oni ofte kaj ĝoje legu; la titolojn vi povas elekti laŭ via gusto. Dum via esplorado de la Esperanta kulturo vi sendube legos pri klasikaj verkoj, aŭ legos recenzojn aŭ konatiĝos kun homoj, kiuj povas rekomendi al vi legendajn librojn.

Kion oni devus koni, kaj kiom detale, en la movada historio?

Por preskaŭ ĉiu esperantisto la historio pri la kreado de la lingvo kaj la kreskado kaj disvastiĝo de la E-movado evoluas laŭgrade, kaj IE spegulas tiun fakton. Je la elementa nivelo oni konu la ĝeneralan historion de la estiĝo de Esperanto kaj de ĝia iniciatinto kaj krome la plej gravajn datojn kaj eventojn en la postaj jardekoj. Je la meza nivelo oni havu pli profundan komprenon pri la evolu(ig)o de la lingvo kaj la movado kaj krome sciojn kaj proprajn opiniojn pri nuntempaj okazantaĵoj.

Kiujn helpilojn mi rajtas uzi en la ekzamenejo?

Dum la ekzameno oni rajtas uzi neniun helpilon, t.e. nek vortaron, nek librojn, eĉ ne manefaritajn notojn. Oni disponigas ankaŭ paperojn por la skribotaĵoj, do, sufiĉas kunpreni nur fidindan skribilon.

Ĉu mi rajtas uzi mian komputilon?

Ne, la uzo de persona komputilo estas malpermesata. Ni rekonas la valoron kaj flekseblon de perkomputila ekzameno, sed ni lasas tiun avenuon por aliaj projektoj kaj plenumantoj. Tial la kandidatoj prepariĝu al tio, ke dum 2-3 horoj necesos mane kaj legeble skribi dum la ekzameno.

Rezultoj, atestilo

Kiam mi ricevos la ekzamenajn rezultojn?

Ĉe UK kaj en aliaj sesioj, kie membro de IEK estas parto de la ekzamena teamo, kandidatoj ricevas kaj la rezultojn kaj la atestilojn surloke. Por aliaj sesioj, la rezultoj estas nur provizoraj ĝis kontrolo de IEK. Definitivaj rezultoj estas anoncitaj tuj post tiu kontrolo kaj la atestiloj senditaj al la prezidinto de LEK por subskribo kaj plusendo al la sukcesintoj. La tuta procezo povas daŭri plurajn semajnojn.

Kio pri la gradoj de sukceso?

La rezulto de la elementa ekzameno estas nur sukceso aŭ malsukceso.

La meza ekzameno havas tri gradojn de sukceso, nome: *kontentiga*, *bona* kaj *tre bona*, depende de la atingita poentsumo. La atestilo indikas la gradon.

Kian atestilon mi ricevos?

Vi ricevos atestilon de ILEI/UEA kun via nomo kaj, kaze de meza nivelo, la grado de sukceso (kontentiga, bona, tre bona). Subskribas ĝin la prezidanto de la Loka Ekzamena Komisiono kaj la prezidanto kaj sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono.

Ĉu la atestilo rajtigas min instrui Esperanton?

La atestilo estas dokumento pri lingvaj kapabloj kaj movadaj, kulturaj konoj. Ĝi neniel pruvas, ke la ekzamenito disponas pri pedagogiaj kaj metodikaj konoj kaj spertoj. En kazo, kiam landaj instancoj postulas atestilon nur pri lingvokonoj kaj akceptas la movadan ekzamensistemon, tiam la atestilo sufiĉos por vi.

Kio okazas se mi ne sukcesos en la ekzameno?

Se vi ne atingos la 60% necesan por sukcesi en la skriba parto, LEK sciigos tion al vi. Tiukaze vi ne rajtas pluiri eĉ al la parola parto. Se vi sukcesos en la skriba parto, sed ne en la parola, vi ekscios ankaŭ tion pere de LEK. Vi rajtas ekzameniĝi denove en alia sesio, kontraŭ nova pago de la ekzamena kotizo. Tiukaze necesos refari ankaŭ la skriban parton. En neniu kazo la organizantoj redonos al vi la pagitan monon.

Specimenaj Ekzamenoj

Elementa Ekzameno

Gramatika testo

Poentoj: 50

Sukceslimo: 70%

Tempodaŭro: 40 minutoj

1. Akuzativo

En la sekva teksto aldonu la mankantajn finaĵojn.

Kelk_____ minut_____ post la kvar_____ ni renkontiĝis antaŭ la katedral_____. La ŝarĝaŭt_____ ni restigis en iu_____ flank_____ strat_____, kaj per du taksi_____ veturis al la ĉemar_____ kampadej_____, kie maten_____ la knaboj luis domet_____. Ti_____ kampadej_____ oni konstruis ne por riĉuloj. Sur la teren_____ maldense staris palm_____ kaj ĉirkaŭ dudek lign_____ domet_____, kelkloke kun sunombreloj super la teras_____, tenisejoj, kaj ŝtonaj vojetoj.

[Ĉiu bona elekto = ½ poento] Atingeblaj poentoj: 10

2. Prepozicioj

Elektu po unu el la sekvaj prepozicioj: al, ĉe, da, de, dum, el, kun, per, po, por, pro. Atentu, ke prepozicio estu nur unufoje uzata.

- Fritz estas germano, _____ Berlino.
- Dum la festo li trinkis tutan botelon _____ ĉampano.
- La gefratoj ricevis _____ kvin eŭrojn _____ la onklo kaj ĝoje dankis lin _____ la donaco.
- Henriko vojaĝas _____ aŭto _____ la tuta familio.
- Ili veturas _____ Francio _____ ferii tie _____ la marbordo.

[Ĉiu bona elekto = 1 poento] Atingeblaj poentoj: 10

3. Transitiveco de verboj

Aldonu la mankantajn finaĵojn laŭnecese. Uzu -is, -igi, -igis, -iĝi, aŭ -iĝis.

- Kiam komenc_____ la festivalo?
- Marta pas_____ du semajnojn en Parizo.
- Karese la patrino sukcesis endorm_____ sian bebon.
- Bonvolu star_____ omaĝe al la mortintoj.
- Morgaŭ mi devos vek_____ je la sesa matene.
- La buso halt_____ antaŭ mia domo kaj du junuloj elbus_____.
f. Kion ni faru por feliĉ_____ lin?

g. Ŝi kviet_____ kaj ĉes_____ plori.

[Ĉiu bona elekto = 1 poento]

Atingeblaj poentoj: 10

4. Tabelvortoj kaj aliaj

Uzu la sekvajn vortojn en la taŭgaj lokoj: *ke, kia, kio, kiu. Aldonu gramatikajn finaĵojn, se necese.*

- a. _____ vi opinias pri tiu afero?
- b. Mi opinias, _____ la vortoj, _____ vi diris, estas tre saĝaj.
- c. Fakte mi tute konsentas en tio, _____ mi aŭdis.
- ĉ. Ĉu vi scias, _____ niaj sportistoj gajnis? Ne, _____ diris tion?
- d. Ĉu vi scias, _____ sportistoj gajnis? Jes, Marko kaj Adamo gajnis.
- e. _____ estis la kuko, _____ via patrino aĉetis hieraŭ? Bonega. Ĉu vi deziras, _____ mi donu al vi peceton?

[Ĉiu bona elekto = 1 poento]

Atingeblaj poentoj: 10

5. Afiksoj

Uzu la sekvajn afiksojn en la taŭgaj lokoj: *-ad, bo-, -ebl, -eg, -ej, eks-, ge-, -il, -ing, -ist, mal-, -uj. Aldonu gramatikajn finaĵojn, se necese.*

- a. La patro de via edzino estas via _____patro.
- b. Ne metu _____plenajn botelojn en la porpaperan rub_____.
- c. Aspirino estas la plej konata kurac_____.
- ĉ. _____patroj devas kunlabori kun instru_____ en la eduk_____ de infanoj.
- d. La lasta filmo de tiu aktoro havis grand_____ sukceson en la kin_____ de Eŭropo.
- e. Ĉu la akvo de tiu fonto estas trink_____?

[Ĉiu bona elekto = 1 poento]

Atingeblaj poentoj: 10

Skriba Parto

Poentoj: 100

Sukceslimo: 60%

Tempodaŭro: 3 horoj

Legu kompreneble

Disponebla tempo: 45 minutoj

Poentoj: 25

Legu la sekvan tekston atente kaj respondu la demandojn.

LITO APUD LA FENESTRO

Jen rakonto aŭdita antaŭ multaj jaroj pri ĉambro en malsanulejo kaj pri la tri senhelpaj kriplaj viroj kiuj okupis ĝin. Tiu, kiu dum la plej longa tempo estis tie,

kuŝis en la lito apud la fenestro; tiu, kiu laste alvenis, okupis la lito plej proksiman al la pordo. La viro apud la fenestro ne havis la povon levi sin ĝis sidpozicio, kaj cetero estis preskaŭ blinda, do ĉio kion li povis vidi tra la fenestro estis la ĉielo, kiu ŝajnis esti ĉiam griza.

Estis la viro en la meza lito, kiu faris la vivon tolerebla por la aliaj du per siaj konstantaj viglo kaj optimismo, kvankam li certe havis nenion pri kio feliĉi. Sur tableto apud lia lito staris eta botelo kun medikamento. Dum la nokto, se li havis kor-spasmon kaj ne tuj sukcesis venigi flegistinojn, li povis malfacilege atingi la botelon kaj trinki sufiĉon por malrapide forigi la doloron.

Dum malvarma vintro la viro apud la fenestro mortis, kaj la aliajn oni movis laŭvice, ankaŭ forigante la trian litojn. Baldaŭ la neestingebla optimismo distris sian senhelfan kunulon per rakontoj pri la aĵoj videblaj tra la fenestro... aŭtomobiloj, ludantaj infanoj, balonvendistino, florĉareto kaj belulinoj kies jupej flirtis pro la vento. Iom post iom tiuj homoj, kiuj ĉiutage preterpasis, ricevis nomojn, kaj la viro en la dua lito aŭdis tiel multe da anekdotoj pri iliaj feroj, ke li komencis senti ilin kvazaŭ geamikojn. Tio helpis pasigi la horojn kaj li estis tre dankema.

Tamen, subite, nova penso eniris lian kapon. Se io okazus al ĉi tiu viro apud li, li mem ricevus la litojn apud la fenestro! Kuŝante senhelpe tie, tagon post tago, li ne povis eviti ke tiu ideo finfine fariĝu obsedo. Li aŭdis atendis taŭgan momenton.

Post kelkaj noktoj la viro en la unua lito komencis suferi tre severan kor-atakon. Li malfacile etendis la brakon al la botelo, sed la alia viro, per preskaŭ superhoma peno, sufiĉe levis la torditan korpon el la lito por puŝi la botelon sur la plankon...

La postan tagon oni donis al li la litojn apud la fenestro. Finfine! Tremante pro ekscito li tuj rigardis tra la fenestro. Kvar metrojn for de ĝi, plenigante la tutan distancon de lia horizonto, staris alta griza muro!

– Betty Salt (el *Lito apud la fenestro*)

Trovu en la teksto sinonimojn de jenaj vortoj kaj skribu ilin en la spacoj. [po 1 poento]

- | | |
|-----------------|-------|
| 1. senviviĝis | _____ |
| 2. ĝoji | _____ |
| 3. altigi | _____ |
| 4. nevidkapabla | _____ |
| 5. ujeto | _____ |
| 6. geknaboj | _____ |
| 7. tujsekvanta | _____ |
| 8. senŝanĝaj | _____ |
| 9. firmamento | _____ |
| 10. eltenebla | _____ |

Respondu la demandojn per kompletaj frazoj. [po 3 poentoj]

1. Kie okazis la aferoj menciitaj en tiu ĉi rakonto?
2. Kia estis la viro en la meza lito?
3. Kiuj homoj (inter aliaj) aperis en la rakontoj de la “neestingebla optimisto”?
4. Kial mortis la dua viro?
5. Kion povis vidi la tria viro, kiam finfine li ekhavis la liton apud la fenestro?

Diktaĵo

Poentoj: 10

Ekzamenanto kelkfoje laŭtlegas tekston, kiu enhavas ĉiun Esperantan literon (simile al la sekva). La kandidato devas skribi ĝin kiel eble plej fidinde. [Ĉiu eraro forprenas duonpoenton.]

Ĵaŭdon Klara kaj ŝia ĉeĥa amikino Jana decidis viziti zoologian parkon. Enirinte, ili unue laŭiris gruzan padon al la centro kaj tie haltis ĉe la loĝloko de la pandoj. Tiuj ĉarmaj estaĵoj plej plaĉis al la knabinoj. La pandoj sidadis antaŭ kaĝo, trankvile frandante branĉetojn da bambuo. Ili ignoris la rorojn kaj ŝrikojn, kiuj eĥis tra la ĉirkaŭaĵoj. Ĉu la bestoj estas malkontentaj kaj volas eskapi al pli feliĉa sorto? Eble ili volas nur al la aliaj specioj anonci sian ekziston. Kiu vere scias? Sovaĝaj blekoj restas nekompreneblaj al homoj. Ili tamen ne ĝenis la rigardadon de la du junulinoj.

Eseo

Disponebla tempo: 60 minutoj

Poentoj: 30

*Verku du-paĝan (ĉ. 400-vortan) eseon pri **unu** el la sekvaj temoj:*

1. Kelkaj konsiloj al nova esperantisto.
2. La interreto kaj la interna ideo.
3. Usona kulturo en mia lando.
4. Jen tipa tago en mia vivo.

La ekzamena komisiono aljuĝos po 10 poentojn por lingva ĝusteco, ideo enhavo kaj stilo.

Aŭskulta kompreno 1

Disponebla tempo: 15 minutoj

Poentoj: 15

Vi aŭskultos tekston dufoje, kun interrompo de triminuta paŭzo. Dum la aŭskultado vi rajtas fari notojn kaj dum la paŭzo vi rajtas eklabori. Poste respondu la demandojn.

AŬSTRALIO ANTAŬ LA EŬROPANOJ

Neniu scias de kie venis la aŭstralia indiĝena popolo, aŭ aborigenoj. Supozeble ili alvenis el la nordaj landoj, kiam la maroj estis malpli profundaj ol nun, kiam la lando, estante ankoraŭ insulo, tamen estis pli facile atingebla. La rokpentraĵoj en norda Aŭstralio kaj aliaj postsignoj indikas, ke la alveno datiĝas de almenaŭ 40 ĝis 50 mil jaroj.

Estas multaj konjektoj pri kiom da aborigenoj loĝis en Aŭstralio antaŭ la alveno, aŭ invado, de la eŭropanoj. Eble troviĝis eĉ unu miliono. Pli fidinda estas la nombro de triboj kaj lingvoj. Specialistoj opinias, ke estis ĉirkaŭ 400.

Se mankis al generacioj de aborigenoj scioj pri aliaj landoj, same mankis al alilandanoj scioj pri Aŭstralio. Oni jam pruvis, ke indoneziaj maristoj serĉante maraĵojn kaj dezirante komercon kun la aborigenoj, vizitis la nordan Aŭstralion antaŭ la alveno de la eŭropanoj. Eblas, ke ankaŭ ĉinaj maristoj tien vojaĝis. Portugalaj kaj nederlandaj maristoj atingis la okcidentan kaj nordan marbordon en al 16^a kaj 17^a jarcentoj: por ili la lando kaj la popolo ŝajnis senvaloraj.

Ne ĝis preskaŭ la fino de la 18^a jarcento la ŝajne uzebla parto – la orienta marbordo – falis sub la okulojn de eŭropanoj: unue britoj, poste francoj. Angla navigisto, kapitano Cook [Kuk], vizitis la orientan marbordon en 1770 kaj raportis favore pri ĝi. Kaj, ĉar pli malpli samtempe Britio perdis siajn punkoloniojn en Nord-Ameriko, la brita registaro decidis starigi ĉe “Botany Bay” novan punkolonion. En 1788 la brita ŝiparo kun soldatoj kaj malliberuloj trovis Botany Bay ne taŭga kaj tial ekokupis alian lokon, kiu poste nomiĝis Sidnejo.

– Kep Enderby (adaptita de *Monato*, 4/1996)

DEMANDOJ

1. Laŭ supozoj, de kie venis la aŭstralia indiĝena popolo? Kio indikas ke la alveno de la aborigenoj okazis antaŭ 40-50 mil jaroj?
2. El kiuj du landoj venis la unuaj eŭropaj maristoj al Aŭstralio?
3. Kiu estas la “uzebla parto” de la kontinento?
4. En kiu jaro vizitis kapitano Cook la orientan marbordon?

Aŭskulta kompreno 2

Disponebla tempo: 30 minutoj

Poentoj: 10

Vi aŭskultos tekston dufoje, kun interrompo de triminuta paŭzo. Faru resumon de ĉ. 80-100 vortoj pri la teksto. Dum la aŭskultado vi rajtas fari notojn kaj dum la paŭzo vi rajtas eklabori.

AŬSTRALIO: UNIKA LANDO

Por multaj homoj, Aŭstralio estas ne multe pli ol kanguruoj, famaj sportistoj, aŭ la sidneja haveno kaj la granda roko Uluru. Tamen, la hodiaŭa Aŭstralio estas la plej multetna, multreligia, multlingva kaj multkultura kontinenta socio en la mondo. Kaj ĝi estas socio, en kiu la homoj loĝas pace kaj kontente.

La historio kaj geografio de Aŭstralio gravas, se oni volas kompreni la aktualan socion.

Unue, la foreco de la lando. Eĉ nun Aŭstralio restas izolita lando. Tio multe influas ne nur ekologion sed ankaŭ la sintenojn de homoj, ĉu indiĝenaj, ĉu tiuj, kiuj venis poste.

Due, la lando estas grandega, insula kontinento, kiu similas al Usono laŭ amplekso. La orient-okcidenta distanco inter Sidnejo kaj Perto similas tiun inter Londono kaj Moskvo. La tuta grandeco proksimiĝas al 768,2 milionoj da hektaroj. La marbordo longas ĉirkaŭ 20 000 kilometrojn. Tri oceanoj frontas ĝin: la pacifika, hinda kaj suda.

Ĝi estas la plej seka kaj plej ebena kontinento en la mondo. Plejparte mankas grandaj riveroj kaj altaj montoj. Triono de la lando estas dezerto aŭ duon-dezerto ne konvena por homa loĝado. La klimato multe varias.

Geologie, Aŭstralio estas la plej malnova kontinento de la mondo. Mineralaj riĉaĵoj relative abundas. Biologie, la lando estas unu el la plej diversaj en la mondo, havante 282 speciojn de mamuloj, 750 speciojn de reptilioj, 800 speciojn de birdoj, kaj 200 speciojn de ranoj. Ekzistas pli ol 200 specioj de eŭkaliptaj arboj. Multaj bestoj, floroj, arboj kaj birdoj estas unikaj.

– Kep Enderby (el *Monato* 4/1996)

Kultura kono

Disponebla tempo: 30 minutoj

Poentoj: 10

Parigu la maldekstrajn indikojn kun la dekstraj. Skribu taŭgan literon en la koncernan spacon, atentante, ke ne ĉiuj literaj respondoj estos bezonataj.

___ Titolo de la oficiala Esperanto-himno	A. A. Cseh
___ Junulara sekcio de UEA	B. 1954
___ Jaro, en kiu aperis la “Unua libro”	C. Verda Stelo
___ Tutmonda E-organizaĵo fondita en 1908	Ĉ. Pekino
___ Urbo, en kiu hejmas la Internacia Esperanto-Muzeo	D. S. Ŝtimec
___ Togolanda verkisto	E. 1917
___ Urbo, en kiu okazis la UK en la jaro 2007	F. PMEG
___ Tre influa hungara poeto, tradukisto kaj redaktoro	G. PIV
___ Verkinto de “Homaranismo”	Ĝ. La Espero
___ Eldonejo kaj disvendejo de Esperanta muziko	H. Oomoto

___ Plej ampleksa nuntempa vortaro de Esperanto	Ĥ. Verda Majo
___ Simbolo sur la Esperanta flago	I. Seulo
___ Jaro de la Unesko-rezolucio pri E-o en Montevideo	J. 1887
___ Interret-konsultebla gvidilo al la gramatiko de Esperanto	Ĵ. K. Kalocsay
___ Jaro, en kiu mortis “la majstro”	K. TEJO
___ Japana religia organizaĵo, kiu delonge subtenas E-on	L. Gbeglo K.
___ Verkinto de “Geografio de miaj memoroj”	M. L. Zamenhof
___ Furora interreta kursejo por lernado de Esperanto	N. Lernu!
___ Libroforma kompilaĵo de modelaj E-lingvaj tekstoj	O. Jokohamo
___ Urbo, el kiu fontas ĉiutaga E-lingva radio-elsendo	P. Vinilkosmo
	R. Vieno
	S. 1905
	Ŝ. Fundamenta Krestomatio
	T. UEA

Parola parto

Poentoj: 50

Sukceslimo: 60%

Tempodaŭro: 15-20 minutoj

Interparolo

Poentoj: 15

Por testi la kapablon samtempe aŭskulti, kompreni kaj paroli, la kandidato devas respondi demandojn kaj interparoli kun la ekzamenantoj pri du el la sekvaj temoj, hazarde elektitaj, dum tri aŭ kvar minutoj. La ekzamenantoj aljuĝas po 5 poentojn por taŭga reago al la demandoj, adekvata uzo de leksiko kaj prononcado.

1. Ŝatokupoj.
2. Muziko.
3. Esperanto-renkontiĝoj.
4. Loĝloko kaj loĝejo.
5. Libro kaj legado.
6. Ĉiutaga laboro.
7. Vojaĝado aŭ feriado.
8. Familio.

Esperanto-kulturo

Poentoj: 20

Laŭ hazardo oni elektas por ĉiu kandidato po du demandojn el listo simila al la sekva. La kandidato devas respondi ilin dum maksimume kvin minutoj. Por taksi la respondojn la ekzamenantoj aljuĝas po 4 poentojn por enhavo, scioj, lingva ĝusteco, lerta lingvouzo kaj klara esprimado de la ideoj.

1. Parolu pri la pionira esperantisto Kabe. Resumu liajn kontribuojn al la evoluanta lingvo kaj klarigu la signifon de la Esperanta verbo *kabei*.
2. Se vi povus partopreni en iu ajn internacia aranĝo aŭ studkurso en Esperantujo, kiun vi elektus? Kial?
3. Kiel Esperanto diferencas de via hejma aŭ nacia lingvo? Kiuj diferencoj faciligas aŭ malfaciligas vian lernadon de Esperanto?
4. Elektu esperantlingvan libron aŭ gazeton kiun vi aparte ŝatas. Mallonge priskribu ĝin kaj diru kio pri ĝi plej plaĉas al vi.
5. Diru kial grupaj renkontiĝoj gravas al la daŭra vigleco de la Esperanta komunumo. Menciu kelkajn konatajn naciajn aŭ internaciajn aranĝojn.
6. Preparolu la tradiciajn simbolojn de la Esperanto-movado kaj ankaŭ la kernajn valorojn, kiuj daŭre karakterizas la Esperantan komunumon.
7. Elektu personon, kiu elstaras en la nuntempa Esperanta komunumo. Donu kelkajn faktojn pri li aŭ ŝi kaj resumu ties kontribuojn al la kulturo.
8. Nomu kelkajn fontojn de humuro, distrado kaj amuziĝo en la Esperanta kulturo. Menciu specifajn ekzemplojn.



Bild(stri)o

Poentoj: 15

La kandidato ricevas bild(stri)on kaj devas klarigi la situacion prezentatan tie. La ekzamenantoj aljuĝas po 5 poentojn por originaleco, lingva ĝusteco kaj taŭga reago al la demandoj.

Rigardu la bildojn kaj klarigu, kio okazas. Estu preta respondi demandojn de la ekzamenantoj.

Meza Ekzameno

Gramatika testo

Poentoj: 110

Sukceslimo: 70%

Tempodaŭro: 50 minutoj

1. Akuzativo

Aldonu la ĝustan finaĵon laŭnecese.

La last___ foj___ kiam mi li___ vidis, li___ venis mi___ viziti, kelkaj___ tagoj___. Poste li___ iris for. Se mi___ sciintus, ke nur monatoj___ poste li___ mortigos, ĉu mi parolus io___? Ni___ ne diris io___ alia___ ol “Ĝis julio___, kara___.” Malfrua___ vok’ transdonis la mesaĝo___ kaj solitero___ pansis la malnokto___. Jam unu jaro___ mi bezonas vorti. Silent’ ne eblas. Rimoj___, ritmoj___ ĝenas. Ĉu eblas vivosperto___ komuniki? Manrique diris ĝi___ antaŭ jarcentoj___ okaze de la mort’ de lia___ patro___. Ankoraŭ ne finiĝis la stuporo___.

[Jorge Camacho]

[Ĉiu bona elekto = 2 poentoj] Atingeblaj poentoj: 60

2. Transitiveco de verboj

Enskribu -ig- aŭ -iĝ- aŭ nenion.

La juna grafo Rolando estis malriĉ___inta ido de gloraj prapatroj, kiuj tutmonde fam___is iam, ĉar ili mort___is multajn malamikojn kaj riĉ___is sin per ties trezoroj. Sed la familiaj riĉaĵoj perd___is, ĉar lia patro far___is viktimo de la malfeliĉ___a turn___anta rado en Montekarlo. Dum kelkaj horoj li tute senmon___is kaj la subita malriĉ___o tiel malesper___is lin, ke li dron___is sin en la maro. La orf___inta Rolando heredis nur la kaduk___intan familian kastelon en la neniam modern___inta vilaĝo Belkamp.

[Ĉiu bona elekto = 1 poento] Atingeblaj poentoj: 15

3. Participoj kaj verboformoj

Trastreku la netaŭgajn formojn en la krampoj, lasante la ĝustan.

Subite [rimarkonte, rimarkinta, rimarkinte], ke la ĉelo estas malplena, la gardisto anoncis al ĉiuj, ke la malliberulo estas [eskapita, eskapinta, eskapinte]. La ĵus [alvenonta, alvenita, alveninta] Oficiro Gates tuj eliris, [serĉante, serĉanta, serĉinte] lin.

[Informinte, Informita, Informite] de kelkaj homoj, ke iu strangulo antaŭ nelonge laŭiris la straton, Gates eksentis, ke tiu [fuĝito, fuĝanto, fuĝanta] estas baldaŭ

[*trovinta, trovota, trovata*]. Post ducent metroj, [*turninte, turnite, turnanta*] la kapon por kontroli strateton, li ekvidis la [*eskapiton, eskapantan, eskapinton*]. Tiu estis [*provita, provinta, provinte*] kaŝi sin malantaŭ [*disfalita, disfalanta, disfalota*] dometo, sed ne sukcesis. Gates kriis, “Haltu, aĉulo!” kaj komencis postkuri la nun [*forrapidantan, forrapidanton, forrapidintan*] homon.

Sperta [*kurinta, kuronto, kuranto*], la policano tre facile kaj rapide mallongigis la spacon inter ili. Nur kelkajn metrojn malantaŭ la ulo Gates sentis, ke li estas tuj [*kaptonta, kaptota, kaptinta*] lin. Kaj tiu bone komprenis, ke restas neniu espero: li estas [*kaptanto, kaptonto, kaptoto*]. Kaj tiel okazis. [*Atinginte, Atingite, Atinginta*] la krimulon, Gates saltis sur lin kaj ĉio estis [*finota, finita, finito*]. La aĉulo estis [*rekaptota, rekaptinta, rekaptita*].

Poste specialan laŭdon donis la ĵurnalo al la kuraĝa [*kaptinto, kaptito, kaptinta*], [*ridetanta, ridetante, ridetonta*] apud la poliestro en granda foto sur la unua paĝo.

[Ĉiu bona elekto = ½ poento] Atingeblaj poentoj: 10

4. Refleksivo

Aldonu la ĝustajn pronomojn, priatentante ankaŭ la finaĵojn.

Profesoro Bonmemor skuiĝis en ____ tuta korpo, ĉar ____ ekvidis sur ____ tuko grandan nodon. Li tuj memoris, ke ____ kolego, sinjoro Adolfo Neforges, profesoro pri matematiko, invitis ____ por hodiaŭ al la tagmanĝo. Li klare memoris, ke profesoro Neforges mem per ____ manoj faris la nodon sur ____ tuko, ĉar ____ konis ____ kiel nekuraceblan forgesemulon. Sed kion fari nun? Li rigardis ____ horloĝon: la tempo jam pasis! Li palpis ____ ventron: tro plena! Tamen por savi almenaŭ la reston de ____ honoro, li rapide lavis ____, razis ____, kombis ____ harojn, vestis ____, prenis ____ pluvombreton kaj kuris al la domo, en kiu loĝas ____ kolego. Sinjoro Neforges afable salutis ____ gaston kaj ofertis al li glason de ____ plej bona vino.

[Ĉiu bona elekto = ½ poento] Atingeblaj poentoj: 10

5. Leksiko

Ligu la maldekstrajn vortojn kun la dekstraj signifoj. Sur ĉiu linio skribu la konvenan majusklan literon.

- | | | |
|-------------------|-------|---------------|
| 1. Feo estas | _____ | A. manĝo |
| 2. Leontodo estas | _____ | B. ornamaĵo |
| 3. Getto estas | _____ | C. korpoparto |
| 4. Ĵipo estas | _____ | Ĉ. birdo |
| 5. Ebrio estas | _____ | D.odoro |

- | | | |
|---------------------|-------|--------------|
| 6. Kreto estas | _____ | E. fabelulo |
| 7. Laktuko estas | _____ | F. vesto |
| 8. Docento estas | _____ | G. stato |
| 9. Kvasto estas | _____ | Ĝ. roko |
| 10. Fetoro estas | _____ | H. manĝaĵo |
| 11. Kartvelio estas | _____ | Ĥ. urboparto |
| 12. Getao estas | _____ | I. veturilo |
| 13. Tempio estas | _____ | J. homo |
| 14. Struto estas | _____ | Ĵ. floro |
| 15. Festeno estas | _____ | K. ŝtato |

[Ĉiu bona elekto = 1 poento] Atingeblaj poentoj: 15

Skriba Parto

Poentoj: 100

Sukceslimo: 60%

Tempodaŭro: 3 horoj

Legu kompreneble

disponebla tempo: 45 minutoj

Poentoj: 30

Legu la sekvan tekston atente kaj respondu la demandojn.

EL “LA VIDVINO PIRSEN”

Ŝi iris al la pordo kaj malferminte ĝin rigardis kun naskiĝanta espero eksteren. Neniu!

Ŝi refermis la pordon, kaj metinte blankan sed eluzitan tukon sur duonon de la tablo ne okupitan de la galanterio, ŝi denove pretigis teon, kaj ekmanĝis la bulkojn, kiujn ŝi aĉetis. Dummanĝe ŝi subite aŭdis la revenantajn paŝojn de Elsi Dunn, kaj ekstaris, streĉe aŭskultante; sed la paŝoj preterpasis, kaj ŝi re-eksidis rezignacie. Tuj poste ŝi bedaŭris, ke ŝi ne malfermis la pordon kvazaŭ hazarde ĝuste tiam, kiam Elsi pasas, kvankam tian taktikon ŝi forte malaprobis, atribuante ĝin al scivolemaj najbaroj.

Ŝi lavis la tason kaj teleron, kaj re-irinte al la fenestro rimarkis, ke ankoraŭ pluvas kun sama monotono de subtilaj gutetoj. Sed kiel gravas al ŝi, pensis ŝi, Pirsens, ĉu pluvas aŭ ne? Ŝi ja havas ŝirmon (pro kio ŝi devas esti dankaj kaj ne

povus iri ien eĉ se estus bele. Sole la malvarmo ĝenas ŝin, kaj fariĝas ja tre malvarme. Ŝi residis en la fotelo volvinde sin en peza lana plejdo (ŝia sola restanta valorajo) prenita de la lito, kaj denove provis legi sian biblion. Sed nun estis eĉ pli malfacile, ĉar jam vesperiĝas; do, metinte la libron sur siajn genuojn, ŝi fermis la okulojn, provante ne pensi pri la fridiganta aero.

Paŝoj aŭdeblis sur la ŝtuparo. Jen aliaj, kaj aliaj! Pordoj klakfermiĝas, kaj voĉoj eksonas de la strato kaj tra la maldikaj muroj. Oni revenas de la laboro. Temanĝoj pretiĝas, kaj familioj renkontiĝas. Baldaŭ eksonos nova tumulto, kiam oni eliros al dancado, al kinoj, kaj al aliaj lokoj, kie oni nun serĉas siajn plezurojn.

Aĥ, ili ĝuu la familian rondon. Tio sufiĉas. Kiel bele, kiam Karlo revenis de siaj vojaĝoj, sidi kun li dum la longaj oraj vesperoj, dum etaj Roĉjo kaj Roza ludis sur la planko; kaj pli poste, kiam la tuta kvaro partoprenis iun senpekan kartludon; kaj kiel bele tiam projekti la estonton, kiam Roĉjo kaj Roza kun siaj propraj familioj venos viziti la maljunajn gepatrojn. Sed io okazis. Kio? Ŝi mense bildigis funebrantajn parencojn ĉirkaŭ eta ĉerko. Ĉu Roĉjo do mortis tiel juna? Ne, ne! Ŝi nur repensas siajn febrajn timojn de la tempo, kiam li suferis de la difterio. Kompreneble li re-saniĝis de tio (ŝia cerbo iras promeni). Kio do? Estis la milito! Jes, la milito! Li fariĝis maristo, kiel lia patro; sed venis la milito. Aĥ, se li vivus nun, ŝi ne estus soleca. Roza estas bona knabino; sed tre malestimas sentimentalon, kaj post kiam ŝi iris Usonon kun sia edzo, skribis nur du-tri fojojn kaj poste silentis. Roĉjo estis alia, sed li mortis, kaj la patro baldaŭ poste mortis, kaj restas nur memoroj.

—John I. Francis (el *Vitrало*)

Trovu en la teksto sinonimojn de jenaj esprimoj kaj skribu ilin en la spacoj. [po 1 poento]

- | | |
|------------------------|-------|
| 1. anticipi | _____ |
| 2. brua malkvietiĝo | _____ |
| 3. senvarieco | _____ |
| 4. senplende akcepteme | _____ |
| 5. tualetaĵoj | _____ |
| 6. protektita loko | _____ |
| 7. atentege | _____ |
| 8. forte ekscititajn | _____ |

Respondu la demandojn per kompletaj frazoj. (Poentvaloro sekvas)

1. Kio detenis la vidvinon malfermi la pordon kiam ŝi aŭdis la paŝojn de Elsi? [4]
2. Kiel ŝi unue reagis, aŭdinte la revenojn de la najbaroj? [4]
3. Kio ĝenis al la korpo de s-ino Pirsen kaj kiel ŝi provis foririgi ĝin? [4]
4. Kio estis la sorto de la filo? [5]
5. Kiun homan senton ĉefe portretas la verkisto per tiu ĉi fragmento? [5]

Eseo

Disponebla tempo: 60 minutoj

Poentoj: 30

*Verku tri-paĝan (ĉ. 600-vortan) eseon pri **unu** el la sekvaj temoj:*

1. Diskriminacio en la Esperanto-komunumo.
2. La zamenhofa vizio: ne nur lingvo.
3. Demokrateco: ĉu por ĉiuj la plej bona vojo?
4. La rolo de sporto en internaciaj rilatoj.

La ekzamena komisiono aljuĝos po 10 poentojn por lingva ĝusteco, idea enhavo, kaj stilo.

Aŭskulta kompreno 1

Disponebla tempo: 15 minutoj

Poentoj: 10

Vi aŭskultos tekston dufoje, kun interrompo de triminuta paŭzo. Dum la aŭskultado vi rajtas fari notojn kaj dum la paŭzo vi rajtas eklabori. Poste respondu la demandojn.

PENSOJ PRI FUNDAMENTISMO

Fundamentismo estas konscia retiriĝo en la propran tendaron, kiun oni kredas minacata de la ekstera mondo. En ekstremaj kazoj oni pretas morti kaj mortigi por savi aŭ eĉ pligrandigi tiun tendaron....

Fundamentismo, kiel mi provis difini, estas evidente danĝera al ĉiu pensanta eksterulo. Ekzemple, “okcidentuloj” facile kondamnas la reciprokan murdodon de hinduoj kaj islamanoj en Hindio, ĉar estas klare al ni, ke la aparteno al hinduismo aŭ islamo estas preskaŭ ĉiam hazarda laŭ la naskiĝloko. Pro la evoluinta inform-teknologio de nia epoko eblas al ĉiu rekoni la relativecon de ĉiaj fundamentismoj.

Ĉu do ĉia fundamentismo estas kondamninda? Nu, kion ni opinii pri la luktoj de indiĝenoj por savi siajn kulturojn, aŭ pri la defendo de minacataj lingvoj? Eble estas multaj psikologiaj similaĵoj, sed ni komparu la mensostaton de la adeptoj de *Erec Israel*, kiuj pro specifa historia nostalgio kredas sin rajtigataj suferigi aliajn homojn, kun tiuj de la aborigenoj de norda Ameriko kaj Aŭstralio, kiuj klopodas savi la lastajn proprajn lingvojn kaj kulturrestaĵojn en subpremanta fremda medio. Kaj ĉu ni ne subtenu la provojn konservi “etajn” lingvojn kontraŭ la ondo de imperiismaj naciaj, eĉ “internaciaj,” lingvoj, kiaj la angla, la hispana kaj la franca? Se ni volas nomi tiujn fenomenojn formoj de fundamentismo, eble ni devas tamen distingi inter la pure sindefendaj kaj la agresaj formoj.

– Trevor Steele (el *Monato* 9/1996)

DEMANDOJ (*poentovaloro sekvas*)

1. Kio, laŭ la verkinto, estas fundamentismo? [2]
2. Kial okcidentuloj facile kondamnas la reciprokan malamon inter hinduoj kaj islamanoj en Hindio? [2]
3. Ĉu la verkinto kredas, ke ĉia fundamentismo estas kondamninda? Kio supozigas tion? [2]
4. Menciu la du formojn de fundamentismo, kiujn distingas la verkinto, kun po unu ekzemplo el la teksto. [4]

Aŭskulta kompreno 2

Disponebla tempo: 30 minutoj

Poentoj: 10

Vi aŭskultos tekston dufoje, kun interrompo de kvinminuta paŭzo. Faru resumon de ĉ. 150-200 vortoj pri la teksto. Dum la aŭskultado vi rajtas fari notojn kaj dum la paŭzo vi rajtas eklabori.

PENSOJ PRI FUNDAMENTISMO (daurigo)

Unuavide estas paradokse, ke ĝuste nun, kiam la konturoj de monda politika strukturo estas malgraŭ ĉio imageblaj, kiam tuja kontakto kun ĉiuj mondpartoj eblas, kiam tiu fasada “Malvarma Milito” malaperis, kaj kiam tutmonda komerco estas realaĵo (eble malbona!) – ĝuste nun milionoj, eble miliardoj da homoj sentas sin bone nur en la propra tendo. Kaj danĝere.

Kiel klarigi tiun paradokson? La unua kialo estas, ke ni travivas epokon de ŝoke rapidaj ŝanĝiĝoj. La neceso adaptiĝi estas timiga al multaj, eble al ni ĉiuj. Fuĝi al “pruvitaj veroj”, ĝui la konatan nestovarmon estas do tre alloge. Kaj la fakto, ke tiuj ŝanĝoj devenas precipe el la uson-eŭropa kulturo, ne plikarigas ilin al homoj en aliaj kulturoj. Povas esti, ke junuloj tutmonde ĝuas “losanĝelesan” muzikon, sed oni ne restas junulo dum la tuta vivo. Eĉ nia parte evoluinta demokratio – eble la plej valora kontribuo de la “okcidento” al la cetera mondo kaj sendube la plej bona politika sistemo en la moderna mondo – estas grandparte “reprezenta” kaj donas al la civitanoj la ŝancon baloti sed apenaŭ vere partopreni.

Tamen probable la ĉefa katalizo de fundamentismo estas la sterileco de la disvastiĝanta mondkulturo. Materiismo, sciencismo kaj konsumismo ne povas longe nutri la homan psikon. La naŭva progresismo, tiel forta antaŭ nur kvardek jaroj, ne povas kaŝi la mankon de spirita bazo. Vole-nevole oni serĉas pli....

Laŭ mi, la plej bona vojo estas libera, intelekta rigora ekzamenado de la pensfluo plej malfermitaj al bonaĵoj, kiuj troviĝas en diversaj tradicioj.... Jes, oni renkontas superstiĉojn, ĉarlatanojn kaj komercistaĉojn, sed ankaŭ plej interesajn kaj riĉigajn homojn kaj ideojn. Finfine, ĉiu el ni devas trovi sian propran vivklarigon; ne plu

eblas transpreni tion de estroj eĉ de la plej grandaj eklezioj aŭ nacioj. Ĝuste tion la fundamentistoj faras: ili blinde akceptas la respondojn de aliaj.

– Trevor Steele (el *Monato* 9/1996)

Kultura kono

Disponebla tempo: 30 minutoj

Poentoj: 20

Plenigu la spacojn en la sekvaj frazoj per la taŭgaj informoj.

1. La fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda, kies “vortoj” estis poste eldonitaj libroforme, estas _____.
2. *La rondo familia*, titolo de libro de Nikola Rašić, aludas al metaforo troviĝanta en kiu poemo de L. L. Zamenhof? _____
3. La verkinto de la malsamstilaj biografioj *Tena: hejmo en mezeŭropo* kaj *Tilla* estas _____.
4. La plej konata afrika esperantisto-verkisto, instruisto, iama UEA-estranano estas _____.
5. Kazimierz Bein (Kabe) gajnis la epiteton “unua stilisto esperantista” pro sia majstra esperantigo de _____, pollingva romano de B. Prus.
6. La klasikan rektmetodan kurson por instrui Esperanton ellaboris kaj unue praktikis hungara pastro _____.
7. La titolo de la unua originala esperantlingva filmo, en kiu rolas i.a. Raymond Schwartz, estas _____.
8. *Kulturo kaj internacia lingvo*, *Paŝoj al plena posedo*, kaj *Humoroj* estas tri verkoj de skoto _____.
9. Kiuspecan konsultlibron sendepende (t.e. ne kunlabore) pretigis Yamasaki Seikō, Ebbe Vilborg kaj André Cherpillod en la jaroj ekde 1989? _____
10. La nova videokurso por instrui Esperanton, verkita de Paul Gubbins kaj realigita en Usono, nomiĝas _____.
11. La superan gvidorganon de UEA, ties “parlamenton”, oni nomas _____.
12. La malavarulo, kiu en 1891 savis la gazeton “La Esperantisto” de bankroto kaj subvenciis ĝian eldonadon dum tri pliaj jaroj, estis _____.
13. “Konservi kaj protekti la lingvon Esperanto laŭ ĝia Fundamento kaj kontroli ĝian evoluon” estas unu el la oficialaj celoj/taskoj de _____.
14. La scienc-fantazia esperantlingva epopeo, verkita de kataluno Abel Montagut kaj eldonita en 1993, estas _____.

15. Nun kun sidejo en Kaliningrad (Rusio), sendependa internacia ĉiumonata magazino fondita en 1909 kaj refondita en 1991 estas _____.
16. Hasegawa Teru, japana esperantistino, kiu edziniĝis al ĉino kaj dediĉis sin al la liberigo de la ĉina popolo, verkis la libron *En Ĉinio batalanta* kaj ankaŭ multajn artikolojn por *Heroldo de Ĉinio* sub la plumnomo _____.
17. La influa dokumento (1980), kies subskribintoj asertis “krizon de identeco” en la esperantistaro kaj esprimis “la neceson motivi nian esperantistecon per io pli kohera” ol “finvenkismo”, estas _____.
18. Lastatempa projekto (kun sidejo en Nederlando) kiu celas interkonatigi diverslingvajn indiĝenajn organizaĵojn kaj doni al ili facile lerneblan komunikilon (t.e. Esperanto), per kiu ili povas kune pritrakti siajn komunajn interesojn, nomiĝas _____.
19. *Tra l’ silento, Historio de la lingvo Esperanto*, kaj *Aventuroj de pioniro* estas tre diversspecaj verkoj de _____.
20. Sukcesiginte la rezolucion de Unesko en Montevideo (1954), _____ fariĝis ĝenerala sekretario (1955-1964) kaj poste prezidanto (1964-1974) de UEA.

Parola Parto

Poentoj: 50

Sukceslimo: 60%

Tempodaŭro: 15-20 minutoj

Interparolo

Poentoj: 15

Por testi la kapablon samtempe aŭskulti, kompreni kaj paroli, la kandidato devas respondi demandojn kaj interparoli kun la ekzamenantoj pri du el la sekvaj temoj, hazarde elektitaj, dum tri aŭ kvar minutoj. La ekzamenantoj aljuĝas po 5 poentojn por taŭga reago al la demandoj, adekvata uzo de leksiko kaj prononcado.

1. Aktivado en la Esperanto-movado.
2. Ŝatokupoj kaj sportoj.
3. Loĝloko kaj loĝejo.
4. Libervola komunuma aŭ civita aktiveco.
5. Muziko.
6. Legado kaj libroj.
7. Vojaĝado.
8. Moderna komunikado.

Esperanto-kulturo


Poentoj: 20

Laŭ hazardo oni elektas por ĉiu kandidato po du demandojn el listo simila al la sekva. La kandidato devas respondi ilin dum maksimume kvin minutoj. Por taksi la respondojn la ekzamenantoj aljuĝas po 4 poentojn por enhavo, scioj, lingva ĝusteco, lerta lingvouzo kaj klara esprimado de la ideoj.

1. Priparolu la diversajn rolojn de la Interreto en la nuntempa Esperanta kulturo.
2. Priparolu la epopeon *La infana raso* kaj ankaŭ ties verkinton.
3. Elektu 3 nuntempajn Esperantajn revuojn aŭ gazetojn kaj resumu iliajn celgrupon, enhavon kaj rolon en la Esperanto-komunumo.
4. Priparolu la aktualan rolon de la Universala Esperanto-Asocio en la tutmonda Esperanta komunumo.
5. Elektu unu kontinenton ekster Eŭropo kaj priparolu la historion kaj/aŭ la nunan staton de Esperanto tie.
6. Elektu virinon, kiu iam internacie elstarigis sin en la Esperanta kulturo. Parolu pri ŝia deveno, ŝia vivo kaj ŝia agado.
7. Nomu unu personon aŭ apartan grupon, kiu post la morto de d-ro Zamenhof multe influis la evoluigon de la lingvo Esperanto, kaj klarigu ties influon.
8. Resumu la aktualan staton de dramo, filmo kaj muziko en Esperanto.

Bild(stri)o

Poentoj: 15



La kandidato ricevas bild(stri)on kaj devas klarigi la situacion prezentatan tie. La ekzamenantoj aljuĝas po 5 poentojn por originaleco, lingva ĝusteco kaj taŭga reago al la demandoj.

Rigardu la bildojn kaj klarigu, kio okazas. Estu preta respondi demandojn de la ekzamenantoj.

Apendico:

Regularo de la elementa kaj meza niveloj de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA

Artikolo 1. Celoj

La Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA servas kiel mezuriloj de la kapableco praktike uzi Esperanton je elementa kaj meza niveloj. Ili celas servi al tiuj Landaj Asocioj, Esperanto-centroj, lernejoj kaj aliaj instancoj, kiuj deziras proponi internacian ekzamenon de Esperanto, ĉu anstataŭ, ĉu paralele kun landaj aŭ regionaj ekzamenoj.

Artikolo 2. Administrado

a) La administrado de la Internaciaj Ekzamenoj okazas sub la gvidado de Internacia Ekzamena Komisiono (IEK), konsistanta normale el sep personoj.

La komisionanoj estu membroj de ILEI kaj havu sperton kiel lingvoinstruistoj kaj meritojn kiel uzantoj de Esperanto. Ilin aprobas la Komitato de ILEI kaj la Komitato de UEA, laŭ propono de la Estraroj de tiuj du organizaĵoj.

IEK havas prezidanton, vicprezidanton kaj sekretariojn, kiujn nomumas la Estraro de ILEI. La servoperiodo de la komisiono estas trijara.

b) IEK zorgas pri Internacia Rajtigita Ekzamenantaro (IRE). IEK rajtas nomumi novajn anojn de IRE laŭbezone. La servoperiodo de IEK-anoj estas trijara kaj ili estas reelekteblaj. IEK rajtas nomumi porokazajn help-ekzamenantojn, kies servoperiodo estas nur unu sesio. Ano de IEK estas aŭtomate ano de IRE okaze de elekto al la Komisiono.

c) La ekzamenadon plenumas tripersona Loka Ekzamena Komisiono (LEK), kies konsiston kaj prezidanton aprobis IEK.

LEK estu internacia kun parolantoj de minimume du malsamaj denaskaj lingvoj kaj konsistu el anoj de IRE, laŭeble kun almenaŭ unu IEK-ano. Esceptokaze se ne eblas trovi trian membron de LEK kun la precizigitaj kvalifikoj, IEK povas transpreni la taskon prijuĝi la rezultojn post la ekzamensesio. Tiukaze, pri la parola parto de la ekzameno nepre fariĝu poste aŭskultebla protokolo.

ĉ) La Internaciaj Ekzamenoj povas esti proponataj dum UK kaj ekster ties kadro sub la administra gvidado de Landa Asocio de UEA, Landa Sekcio de ILEI, de internacia aŭ regiona

Esperanto-centro aŭ alia institucio kaj sub la faka gvidado de tripersona LEK. IEK pere de sia sekretario skribe aprobas la proponon de la loka administra institucio, la lokon kaj daton de la ekzamenado kaj la konsiston de LEK interkonsente kun la IEK-prezidanto. Por la Elementa Ekzameno minimume du el la membroj de LEK devas esti anoj de IRE. Por la Meza Ekzameno ĉiuj tri anoj de LEK devas aparteni al IRE.

Artikolo 3. Devoj de IEK

a) Pristudi ĉiujn problemojn rilate al la organizado de Internaciaj Ekzamenoj en kaj ekster la Universalaj Kongresoj.

b) Ellabori regularojn, postularojn, specimenajn testojn kaj ĉiujn necesajn dokumentojn.

c) Prepari taŭgajn tekstojn, kiuj konsistigos la testomaterialon por la organizotaj ekzamensesioj.

ĉ) Konsistigi IRE-n per laŭperiodaj aŭ laŭbezonaĵ normigoj kaj prizorgi la enkondukon kaj spertigon de novaj ekzamenantoj tiel, ke konsekvencaj ekzamenaj normoj estu gardataj en ĉiu ekzamena sesio.

d) Aprobi ĝustatempe konsistigon de LEK por ĉiu organizota ekzamensesio kaj certigi, ke la prezidanto de IEK ricevu la uzendajn ekzamenajn testojn, instrukciojn kaj atestilojn.

e) Teni zorgan registradon de ĉiuj ekzamenaj reguloj.

f) Funkcii kiel apelacia instanco en kazo de kontesto. Cetere IEK ĉiam havas la rajton kontroli la taksadon de LEK kaj se necese revizii la rezultojn. Se evidentiĝas, ke la rezultoj prezentitaj de la LEK ne konformiĝas al la normoj de IEK, la sekretario de IEK sendu klarigojn al la prezidanto de LEK.

g) Raporti ĉiujare al la estraroj de ILEI kaj UEA pri la farita laboro. La anoj de IEK interkonsente dividas inter si la taskojn. Kvankam parto de IEK povas foje kunsidi dum Esperanto-aranĝoj, ĝia komuna laboro necese okazas ĉefe per retroŝto.

Artikolo 4. Devoj de LEK

a) La prezidanto de LEK ricevas la ekzamenajn testojn kaj certigas ilian sekurecon antaŭ la ekzameno.

b) La LEK atentigis kaj atentigu la kandidatojn, ke nur kandidato sukcese trapasinta la gramatikan teston rajtas fari la skriban parton kaj nur kandidato sukcese trapasinta la skriban parton rajtas fari la parolan parton.

c) Post ĉiu ekzamena parto, LEK, sub la gvido de la prezidanto, kontrolas kaj pritaksas aparte la skribajn kaj parolajn respondojn. Surbaze de tiuj du notoj LEK aljuĝas la finajn notojn por la atestiloj.

ĉ) La prezidanto de LEK en la daŭro de la sekvaj 10 tagoj post la fino de la sesio resendas al la sekretario de IEK subskribitan ekzamenan protokolon kune kun la skribitaj ekzamentestoj. Post kontrolo de la ekzamenaj testoj, kaj en dubaj kazoj konsultiĝo kun aliaj IEK-anoj, la IEK-sekretario liveras perpoŝte atestilon al la sukcesintaj kandidatoj, kaj konfirmas la rezultojn al la prezidanto de LEK. Se tamen en LEK aŭ ĝiaj helpantoj troviĝas almenaŭ unu IEK-ano, ekzemple ĉe Universala Kongreso, la LEK rajtas laŭ antaŭa konsiliĝo kun IEK kaj kun konsento de la ĉeestanta IEK-ano elekti post korektado tuj anonci la rezultojn kaj disdoni la atestilojn.

Artikolo 5. Deziro pri ekzamenado

Instanco, kiu deziras proponi organizadon de la Internacia Ekzameno devas skribi peti tion de la sekretario de IEK almenaŭ tri monatojn antaŭ la dato de la dezirata okazigo de la ekzamensesio.

Artikolo 6. Enhavo de la ekzamenoj

La ekzamenoj estas unulingvaj, t.e. nur en Esperanto. Ili konsistas el gramatika testo, skriba kaj parola partoj. IEK decidas pri la formo kaj enhavo de la ekzamenoj kaj rajtas ŝanĝi ilin surbaze de spertoj kaj pliaj konsideroj.

Artikolo 7. Notoj kaj atestoj

a) Sukcesa ekzamenito ricevas atestilon enhavantan la finan noton, subskribitan de la prezidanto de LEK kaj la sekretario kaj prezidanto de IEK.

b) Por aljuĝi finan noton al kandidato plenuminta Elementan Ekzamenon LEK devas decidi inter du eblecoj, kiuj vorte estas esprimeblaj jene: sukcese – malsukcese.

c) Por aljuĝi finan noton al kandidato plenuminta Mezan Ekzamenon LEK devas decidi inter kvar eblecoj, kiuj vorte estas esprimeblaj jene: tre bone – bone – kontentige – malsukcese.

ĉ) Kandidatoj ricevintaj la noton “malsukcese” ricevas de LEK anstataŭ atestilon personan sciigon pri tiu rezulto. Tamen, kandidatoj plenumintaj la Mezan Ekzamenon kaj malsukcesintaj je marĝeno de ses poentoj aŭ malpli ricevas de LEK atestilon pri sukceso en la Elementa Ekzameno.

Artikolo 8. Financoj

a) La kasisto de ILEI rilatas pri financaj aferoj kun la sekretario aŭ alia IEK-ano laŭ decido de la komisiono.ss

b) La kasisto de ILEI prilaboras ĉiujare buĝeton por IEK. Fine de ĉiu jaro la ILEI-kasisto kompilas finkalkulon.

c) La spezoj pri la ekzamenoj estas registritaj en ekzamena konto, kiun prizorgas la kasisto de ILEI.

d) Ekzamenoj devas pagi ekzamenan kotizon, egalan al 60% de MA-kotizo de UEA por la loĝlando de la kandidato. Kun antaŭe interkonsentita aprobo de IEK, LEK rajtas decidi pri forfaligo de la kotizo kaj pri rabato por fruaj sinanoncantoj.

ĉ) Buĝete antaŭviditaj elspezoj de IEK-anoj kaj LEK-anoj estas kompensitaj el la ekzamena konto.

Artikolo 9. Aliro al Ekzamenoj

Diplomiĝo pri la Elementa Ekzameno ne estas antaŭkondiĉo por kandidatiĝi por la Meza Ekzameno. ILEI kelkfoje okazigas preparajn kursojn lige kun ekzamensesioj, sed tiuj estas nedevigaj. IEK laŭeble faciligos aliron al la ekzamenoj de kandidatoj nepovantaj memstare kompletigi ilin, pro manko de normalaj kapabloj aŭdi, vidi, paroli aŭ manskribi.

Reviziita de IEK, 2007

Aprobata de la komitato de UEA dum UK en Jokohamo, Japanio, en aŭgusto 2007

Aprobata de la komitato de ILEI dum ILEI-konferenco en Ranzan, Japanio, en aŭgusto 2007



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas faka organizaĵo aliĝinta al UEA. Ĝi havas sekciojn en 32 landoj kaj ĉiujare okazigas konferencojn kun fakaj prelegoj, modellecionoj, diskutrondoj, eblecoj ekzameniĝi. La oficiala organo de ILEI estas *Internacia Pedagogia Revuo*, kiu aperas kvarfoje jare. Pli da informoj pri ILEI troviĝas ĉe www.ilei.info.

La funkciigo de ĉi tiuj ekzamenoj estas nur unu el la multaj fakaj agadoj de ILEI. Por ke la eduka laboro ene de la Esperanto-movado plu iru antaŭen, ILEI bezonas fortan bazon, kiun konsistigas la membroj. Profesiaj kaj neprofesiaj instruistoj estas bonvenaj, same kiel ĉiuj kiuj interesiĝas pri edukado kaj instruado.

Se vi deziras aliĝi al ILEI, uzu la ĉi-suban formularon aŭ kopion, aŭ sendu la samajn informojn per retroŝto.

Aliĝilo al ILEI

Bv. plenigi kaj sendi al la ILEI-kasisto: D-ro Sjoerd Bosga, Tråddragargatan 27 D, 723 37 Västerås, Svedio; aŭ mesaĝi kun samaj informoj al sjoerd@esperanto.se.

Nomo kaj FAMILIA NOMO _____

Adreso _____

Mi deziras membriĝi al ILEI por la jaro(j) _____

kaj pagas _____ (sumo) _____ (valuto) al
_____ per _____.

Dato _____ Subskribo _____

La jarkotizo valoras EUR 18,00 por loĝantoj en landoj de A-kategorio laŭ UEA kaj SEK 80,00 aŭ EUR 9,00 por loĝantoj en landoj de B-kategorio. Vi povas pagi rekte al nia kasisto uzante la svedan poŝtĝirkonton 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken (IBAN: SE56 8000 0832 7999 4515 0143; BIC/SWIFT: SWEDSESS), aŭ al la konto de ILEI ĉe UEA: *ilek-a* sendante la kotizon al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ pere de via landa peranto, kiu akceptos vian pagon en loka valuto.

